

Spirito Sankta, venu por

Alfred Conzeth kaj Richard Hoppe (1965) laux Michael Schirmer (1640)

melodio: Philipp Nicolai (1599)
duvocxa komponajxo: Christoph Dalitz (2013)

aldo
1. Spi - ri - tu Sank - ta ve - nu por /

tenoro
8 1. Spi - ri - tu Sank - ta, ve - nu

lo - gxa - di nun en ni - a kor' / ho mon - tru Vi - an

8 por / lo - gxa - di nun en ni - a kor' / ho mon -

gxo - - - jon! Kaj Vi - a he - - la bri -

8 tru Vi - an vo - jon! Kaj Vi - a he -

- - - lo nun / en ni e - fi - ku ki -

8 la bri - lo nun / en ni e - fi - ku

- el sun' / kaux - zan - te en ni gxo - - - jon. Vo - jon /

8 ki - el sun' / kaux - zan - te en ni gxo - jon!

Cxi tiu verko estas disponebla laux la permesilo Krea Komunajxo Atribuite-Samkondicxe 4.0 Tutmonda (CC-BY-SA). Tio signifas, ke estas permesite prezenti, multobligi, disvastigi aux registri la verkon senpage. Por la tuta teksto de tio permesilo, vidu jen: <http://creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eo>

gxo - jon / _____ se _____ ni glo - - -

Vo - jon / gxo - jon / vi ja ko - nas / kaj Vi do - nas / se ni glo -

ras / kaj el ko - - ro Vin ad - o - ras.

ras / kaj el ko - ro Vin ad - o - ras.

ripetu ekde la signo lauxplacxe

2. Ho fonto, kiu versxas sin / en piajn korojn ja sen fin': /
konsolon lasu auxdi,
por ke en sama fido ni / kun cxiuj homoj tie cxi /
Vin cxiam povu lauxdi.
Auxdi: / lauxdi / ni Vin volas. / [Vi konsolas /
nin en sorto] / dum la vivo kaj en morto.
3. Nin cxiam do konsilu nun / kaj Vi mem gvidu nin al sun'. /
La vojon ni ne konas.
Kaj persistecon donu Vi / por ke fidelaj restu ni. /
Konsilon ni bezonas.
Vidu, / gvidu. / [Vi instruas / kaj konstruas.] /
Ni gxin vidas / kaj al Vi ni cxiam fidas.
4. Emfazon donu al la Vort', / ke gxi per la cxiela fort' /
en niaj koroj brilu,
por ke per Via am-doktrin' / la tuta kristanaro sin /
al Vi nun asimilu.
Vorton, / forton / al ni donu, / [ke rekonu /
ni la Kriston] / kiel la elacxetiston.
5. Ho dolcxa roso, falu Vi / el la cxielo super ni. /
Briligu nian amon,
ke cxiam kun kompatu ni / kunulojn traktu kiel Vi. /
Ni sentu Vian flamon.
Flegu, / regu / [ne intrigo, sed instigo] /
al la paco. / Benu nin per Via graco.

La traduko estas elprenita de la kantlibro "Adoru" (IKUE & KELI, Ponto, 2001), No. 351.

Por la plej aktuala versio de cxi tiu eldono aux por eldonoj en aliaj lingvoj, vidu:

<http://music.dalitio.de/choir/dalitz/o-heilger-geist/>